

## Forpasis Tony Judt 1948-2010

La 6an de aŭgusto 2010 en Novjorko Tony Robert Judt, mondfama brita historiisto kaj universitata profesoro, forpasis pro la sekvoj de grava malsano, en la aĝo de nur 62 jaroj. Kiel la legantoj de *Spegulo* certe memoras, ni publikigis la esperantigitan tekston de lia prelego farita la 30an de novembro 2007 okaze de la transdono de la Hannah-Arendt-premio (*Spegulo*, aŭtuno 2008).

Naskita en Londono la 2an de januaro 1948 de patrino, kies gepatroj elmigris el Ruslando, kaj de belga patro, kiu originis de litovaj rabenoj, Judt edukiĝis en la Emanuel-lernejo de Londono kaj studis en la King's College de Kembriĝo, kie li doktoriĝis en 1972 pri historio. Poste li daŭrigis siajn studojn en la Normala Supera Lernejo de Parizo.

Interesa estas lia ideologia evoluo. Kiel kutime ĉe (politike maldekstraj) judoj de lia generacio Judt estis cionisto kredante je la socialismo laŭ la israela modelo. En la 60aj jaroj li partoprenis la agadon de kibuco kaj disponigis sin en la Sestaga Milito de 1967 por helpservi en la armeo. Sed baldaŭ li komencis dubi pri la elektita vojo. Kiel multaj aliaj, ekzemple Arthur Koestler, Manès Sperber aŭ Leszek Kołakowski, ankaŭ Judt forlasis skeptika la marksismon, alprenante kontraŭkomunisman sintenon kun simpatio por la atingoj de la „universalisma socialdemokratio“. De la komunismo kaj de la israelaj utopioj li konsideris sin kuracita.

Judt reiris al Britio por fariĝi universitata karierulo. Antaŭ ol veni en 1987 al Novjorko, li instruis politologion en la Oksforda universitato. Ekde 1995 li gvidis la de li fonditan Remarkan Instituton pri eŭropaj studoj de la Novjorka Universitato. Ĉi tiu nobla institucio iusence ludis la rolon de la intelekta Eŭropo-lobio en Usono. Judt estis stipendiulo de la Brita Akademio, membro de la historia fakultato de U.C. Berkeley, de la Amerika Akademio de Artoj kaj Sciencoj, de la Royal Historical Society, de la John Simon Guggenheim Memorial Foundation kaj de aliaj organizoj.

Sekve, Eŭropo fariĝis la ĉefa esplor-fokuso de Tony Judt, kaj sur ĉi tiu kampo li plenumis herkulajn laborojn. Lia monumenta verko ‚Postwar: A History of Europe Since 1945‘ (en la germana lingvo aperinta kiel ‚Historio de Eŭropo de 1945 ĝis la nuntempo‘) fariĝis ne nur bestselera, sed ankaŭ standarda kaj fama eĉ trans la mallarĝaj akademiecaj medioj.

Sed Tony Judt okupiĝis ne nur pri eŭropa historio de la 19a jarcento, aŭ pri la historio de la francaj maldekstraj intelektuloj, pri la belga krizo, pri la EU-sankcioj kontraŭ Aŭstrio, pri la skandinava bonfarto-sistemoj kaj la problemoj de la multkultura kunvivado en Nederlando, kaj nature pri socia justeco. Sed li kontroverse starpunktis ankaŭ pri usonaj aferoj kaj israela politiko, lanĉante akran kritikon kontraŭ la usona prezidento George W. Bush kaj ties hegemonia politiko post la 11a de septembro 2001. Ripete li traktis la konflikton en Palestino kaj skeptike rilatis al Israelo. Laŭtan kritikon li rikoltis kiam li sugestis en *New York Review of Books* kaj en *Le Monde Diplomatique*, ke la homoj en tiu regiono vivu en aparta, tolerema demokrata ŝtato por judoj kaj araboj, eble eĉ laŭ la sudafrika modelo. En sia artikolo li nomis la israelan ŝtaton „anakronisma“, ĉar ĝi nomas kaj pritaksas siajn civitanojn laŭ etnaj-religiaj kriterioj, dum „ni vivas en mondo, en kiu ŝtatoj kaj popoloj estas interplektitaj pli kaj pli intense, en kiu la homoj pli kaj pli evoluas laŭ kompleksaj, libere elekteblaj identecoj kaj kiuj sentus sin sufiĉe limigitaj, se oni fiksus ilin laŭ unusola identeco.“ Estas evidente, ke per tiaj elpaŝoj skandalaj ne estis eviteblaj.

Flanke de ultracionismaj judaj cirkloj Judt devis elteni malbelajn kaj maljustajn riproĉojn: Kiel „naivaj“, eĉ „antisemitismaj“ liaj ideoj estis kvalifikitaj kaj rifuzitaj. En 2006 oni malhelpis lin prononci prelegon en la pola konsulejo de Novjorko pri la influo de la israela lobio sur la usonan eksteran politikon, ĉar judaj organizaĵoj, precipe la fifama Anti-

Defamation League de Abraham Foxman, akre protestis. Same li frontis kontraŭstaron okaze de la transdono de la Hannah-Arendt-premio en 2007 en Bremeno (Germanio), kiam en Malferma Letero la juda komunumo de Bremeno avertis, ke Judt „disvastigas la oficialan palestinan propagandon rilate la historiografion“. Supozeble tiuj konservativaj judaj organizaĵoj troigis kaj diskreditis sin mem, ĉar ili ne rimarkis, ke Judt estis nek radikala nek fundamentisma Israelo-kritikanto. Al tiu malamikeco Judt reagis en sia bremena parolado per la jenaj por lia pensado karakterizaj frazoj: „Kaj vokante ‚antisemitismon!‘ ĉiufoje, kiam iu atakas Israelon aŭ defendas palestinanojn, ni edukas cinikulojn. Ĉar estas vero, ke la ekzisto de Israelo ne estas minacita. La judoj en Okcidento ne spertas minacojn kaj danĝerojn, kompareblajn kun tiuj el la pasinteco aŭ kun modernaj antaŭjuĝoj pri aliaj minoritatoj. (...) Se ekzistas ia minaco, kian devus eksenti judoj, kaj ankaŭ la ceteraj homoj – do ĝi venas de alia flanko. Ĉar tiel firme ni ligis la memoron pri la holokaŭsto kun la defenda pledo por unu lando – Israelo, tiel ke ekzistas la danĝero, ke la morala signifo de tiu memoro limiĝas provincece.“ Post tiuj krudaj judaj atakoj sentis sin minacataj krom Judt mem ankaŭ aliaj elstaraj usonaj verkistoj, parte juddevenaj, ekzemple Fritz Stern, Timothy Garton Ash, Leon Wieseltier, Mark Lilla und Richard Sennet – eĉ se ili ne troviĝis sur la sama politika linio kiel Tony Judt.

En sia diligente verkita, sendube brila ‚Historio de Eŭropo de 1945 ĝis la nuntempo‘ Judt ankaŭ prilaboris la hipotezon, ke la memorado pri la holokaŭsto garantias la humanismon de la nuntempa Eŭropo kaj ke ĝi formas la identecon en landoj kiel Francio, Aŭstrio kaj Pollando. Kaj „se oni forgesos memori ĝin, tiukaze oni devos instrui ĝin“. Jen lia pledo kontraŭ la procezo de la historia forgesemo kaj ĝia anstataŭo per kovrado per mitoj kaj legendoj, kiun li observis en Eŭropo. Tio validas kaj rilate al la Vichy-ŝtato kaj al la ekonomia krizego en la Tridekaj jaroj, ekzemple. La Israelo-lobion de Usono, kiu fakte formas nur malgrandan minoritaton inter la usona judaro, kiu ĝenerale kondukas libérale, ne parolas la jidan aŭ hebrean kaj nek konas Israelon per propraj spertoj, li riproĉis pro tio, ke ĝi celas ĝerme estingi ĉian kritikan diskuton, Pri la usona politiko en Israelo sub Obama kaj Hillary Clinton Judt opiniis, ke principe nenio ŝanĝiĝos. Kiam li vizitis Azion kaj Latinamerikon Judt konstatis, ke la tieaj civilizoj preferas orientiĝi laŭ la eŭropa modelo malfavore al la ĉina aŭ usona.

Por siaj kuraĝaj elpaŝoj kaj verkoj Tony Judt ricevis krom la Hannah-Arendt-premio ankaŭ la Erich-Maria-Remqraue-pacpremion de la urbo Osnabrück kaj la Kreisky-libropremion en Aŭstrio.

Post la diagnozo de nerva malsano oni konstatis ĉe Tony Judt la relative maloftan amiotrofan lateralsklerozon (aŭ Gehrig-sindromon), kiu kaŭzas grandpartan paralizon de la muskoloj. Ĉi tiu diagnozo egalas mortverdikton, sed pri suicido Judt neniam pensis, ĉar lia planebla morto estus kontrolebla. Pro tiu malsano la aŭtoro devis esti artefarite vivigita per spirmaŝino. Kio signifas, ke praktike li ne plu kapablis paroli kaj moviĝi. Tiel li sentis sin kiel vivantan kaj penskapablan mumion sen nervoj kaj muskoloj. Malgraŭ tiu kruela kaj rapide akriĝinta malsano, kies kuracado kosis en Usono cent mil dolarojn jare (en Skandinavio tia kuracado estus senpaga por la malsanuloj), Judt ankoraŭ verkis kaj publikigis artikolojn kaj eseojn. En 2010 aperis en Germanio la volumo „pri la forgesita 20a jarcento kaj la reveno de la politika intelektulo“ kun liaj legindaj tekstoj pri Hannah Arendt, Albert Camus, Eric Hobsbawm, Primo Levi, Johano Paŭlo II., kun komentoj pri Israelo, Rumanio kaj la Frida Milito kaj kun reflektoj pri la rilatoj inter Usono kaj Eŭropo. Kiel Judt mem ĉiuj tiuj intelektuloj iusence kaj laŭ propra maniero „naĝis kontraŭ la fluo“ de sia tempo. Lia plej nova verko ‚Ill Fares the Land‘ ŝajne ankoraŭ ne estas tradukita al aliaj lingvoj. En tiu libro li klarigis al la Okcidento, ke ĝi rezignis pri la demokratiaj atingoj de la pasinteco, same kiel ĝi oferis la bonfarto-ŝtaton al la riĉeco-kulto, kaj nelaste, ke ĝi ignorus la kreskantan abismon inter riĉo kaj malriĉo. Se

morgaŭ la homaro volus kapti sian ŝancon, ĉion tion necesus ŝanĝi. Por la socialdemokratio Judt vidis la taskon de la morala respondeco. Sed laŭ li ĝi grandparte perdis ĝin, preferante pli kaj pli la ekonomian efikon, kreskon kaj profiton anstataŭ la socia justeco. La minaretan malpermeson, kiun la svisaj voĉdonantoj akceptis en tutlanda referendumo, li nomis „embarasan esprimon de malprogresinta ŝovinismo“ en lando „efika sed provinceca, belega sed enua, gastama sed malĉarma“. Malgraŭ ĉio, en Mürren, Berna Oberlando, la belega, gastama sed enua svisa provinco, kie eblas agrable feriadi, li tamen ne nepre volus morti, kiel li konfesis en skriba intervjuo al la berna gazeto ‚Der Bund‘ en junio 2010.

Judt vivis kun Jennifer Homans, kritikistino pri dancado, en Novjorko, kaj havis du filojn.

Estas tipe kaj karakterize por la indiferenta Esperanto-movado, ke ĝi malatentas tiajn elstarajn aŭtorojn kiel Tony Judt – artikolo pri Tony Judt en la esperanta Vikipedio mankas.

© Andreas Künzli 2010